

# Sud-Rejna Kuriero

Januaro  
2014

## Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°53

Espace 110  
FR-68110 ILLZACH  
CCP 19684 F Strasbourg  
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel  
Postfach 178  
CH-4005 Basel  
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,*

*La ferioj jam apartenas al pasintaj eventoj. Tamen restas ankoraŭ memoraĵoj, fotoj kaj rakontoj, kiujn vi povas trovi en ĉi-tiu numero inter-alie pri Islando, kaj Hispanio.*

*Ankaŭ pli lokaj eventoj indas menciĝi kun eventoj de la nova lernojaro, kunveno en Frajburgo, aŭtuna staĝo en Speyer.*

*Intertempe ekfunkcias la kursoj en Espace 110 kaj niaj verdaj fadenoj en Mulhouse kaj en Saint-Louis.*

*En novembro refoje okazos samtage "Bédéciné" en Illzach kaj "Justa komercado" en Ungersheim. Dank'al bonvolemaj deĵorantoj, ni sukcesos partopreni en ambaŭ.*

*Krome nia asocio organizos la Zamenhof-feston la 14an de decembro en Mulhouse. Ni trovos jam provizoran programon.*

*La printempa staĝo okazos komence en aprilo 2014. Nia grupo transprenis ĝian organizadon. Jam aperas informoj kaj aliĝilo en ĉi-tiu numero.*

***Feliĉan kaj sano-plenan novan jaron  
2014***

- Lunde 28.10.2013 Saint-Louis Babilado „Verda Faden“  
ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
- Ĵaŭde 28.11.2013 Monata kunveno : Ni pretigas la novan programon  
en Riehenring 129 (antaŭa salono) Ek de la  
20a15
- Sabate 14.12.2013 Zamenhofa festo en Mulhouse Francio  
provizora programo je paĝo 17

**Nicole Bérout**

## **KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2014-2017**

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivaĵojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

**Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.**

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

<b>Jaro</b>	<b>Kotizo</b>	<b>Abono</b>
2014	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2015	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj
2016	6,50 eŭroj	6,50 eŭroj

Pagebla al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM  
Ĉekojn je la nomo de: Mulhouse-Espéranto CCP 19684 F Strasbourg.

## Forpasis nia amiko Pol Denis kaj redaktoro de La Informilo



La 21an de novembro ni estis informitaj, ke forpasis Pol Denis, nia senlaca ĉefredaktoro de LA INFORMILO. Isabelle la filino informis nin pri la forpaso de sia patro pro subita koratako. Ni adaŭas Pol post longjara senlaca laboro por la sukceso de nia kara lingvo".

*Al ĉiuj proksimuloj de Pol Denis kaj al tiuj, kiujn li amis kaj/aŭ lin amis, mi aparte postulas esti iamaniere membro de via familio kaj kredu min, mi ne nur per simplaj vortoj kunsuferas pro la foriro de nia amiko Pol Denis. Ni ĉiam lernos de li kaj ekde nun aŭskultas lin severe grumbli nin, por ke ni ĉesu plori kaj estu feliĉaj kaj por daŭre kaj gaje affrontu la batojn de la vivo.*



Pol Denis, en mia memoro, ne nur de esperantisto, estas grava persono. Mi ne scias, kiu sin vere kaŝis malantaŭ tiom da inteligenta humuro kaj ĉiama gajeco. Pol Denis estis kapabla samtempe montri la saĝecon kaj la ŝercemon, kiuj estis egalrajtaj en liaj sintenoj. Fakulo en spritaĵoj, postulita epikuristo, Pol Denis certe neniam tedis, eĉ se povus esti iom da tiklado kaj miro vidi tiun homon daŭre preni



sur sin la tempopason sen perdi la viglecon kaj la amon al la vivo, kvazaŭ li estus eterna junulo.

Pol Denis sukcesis majstre mastri La Informilon, kies regiona komunumo de Esperanto povas esti fiera. Pol Denis ofte enkuraĝigis min por miaj skriboj, eĉ se li estis ĉiam iom tro pardonema.

Ni perdis fraton, patron, amikon. Nun restas al ni vivigi lin en niaj sintenoj, pensoj, agoj. Li estis unu el tiuj lumturoj, kiujn oni tro malofte renkontas sur sia vojo. Dank' al sia forta personeco kaj malgraŭ la forpaso li daŭre donos al ni lumon por nia ĉiutaga vivo kaj nia esperantisteco.

Dankon Pol Denis. Kie vi estas ni iros. Sed nun kaj tiom longe, kiom ni kapablas pensi, vi restas vivanta en niaj memoroj kaj estos nia kunulo en niaj vivoj kaj agoj.

Masevaux (Francio), la 22-an de novembro 2013.

Bernard Behra



**LE COMITÉ DIRECTEUR  
DE L'ASSOCIATION ESPERANTO-FRANCE-EST**

a le regret de faire part du décès de

**Monsieur Pol DENIS**

**Rédacteur en chef du bulletin LA INFORMILO**

Il a représenté notre association dans des congrès aux quatre coins du monde et a produit et diffusé LA INFORMILO pendant plus de quarante ans.

**55000 Bar-le-Duc**

Niaj plej sinceraj kondolencoj iras al lia familio.  
Ni ne forgesos lian senlacan laboron.  
Nos condoléances les plus sincères à sa famille.  
Nous n'oublierons pas son infatigable ardeur au travail.

901 99990

Pliaj fotoj de nia amiko Pol estas videblaj en nia retejo <http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr> poste ĉe "Nos albums photos"

## Verdaj fadenoj por amike babili nur en Esperanto

Jacques kaj Bertrand regule informas nin pri la verdaj fadenoj en Saint-Louis kaj en Mulhouse pere de nia dissendolisto. Principe ili okazas en la lasta lundo de la monato, krom en la feriaj monatoj kaj en decembro.

En Saint-Louis ni volonte akceptas membrojn de la bazela grupo. En Mulhouse ni povas kunsidi en aparta ĉambro de la restoracio.

La temoj de la babiladoj estas plej diversaj, filozofiaj, kiel ilin ŝatas Bernard, sed ankaŭ por diskuti pri niaj aktivaĵoj; partopreno kaj deĵorado al Esperanto-budo aŭ organizado de Zamenhof-festo kaj printempa staĝo



La lokoj estas:

### **En Mulhouse:**

en la kafejo: 7 rue du printemps

### **En Saint-Louis:**

en restoracio: de la Poste, 10 rue de Huningue.

En 2014 la venontaj fadenoj okazos:

27an de januaro en Saint-Louis

24an de februaro en Mulhouse

24an de marto en Saint-Louis

28an de aprilo en Mulhouse

26an de majo en Saint-Louis

30an de junio en Mulhouse



# En Illzach: Bédéciné kaj en Ungersheim: Foiro pri "Ekologio kaj justa komercado"

En la semajnfino de la 16a kaj 17a de novembro 2013, nia grupo sukcesis partopreni en du manifestacioj, nome en Illzach, kie okazis Bédéciné kaj en Ungersheim ĉe foiro pri Ekologio kaj justa komercado.

Tamen pro manko de deĵorantoj, ni sukcesis deĵori en ambaŭ lokoj nur sabate. En Illzach estis Bertrand kaj Andreo. En Ungersheim deĵoris alterne Roberto, Edmond, Simone kaj Andreo

Certe la etosoj en ambaŭ lokoj malsamas. En Illzach ĝi estas pli festa, amuza. Ni tamen sukcesis vendi iom da bildrakontoj de Tinĉjo.

En Ungersheim la tuto eble pli serioza kun celo pri ekologio. Eble tie pli taŭgas Esperanto kiel justa lingvo "Langue Equitable".

Certe la diversaj deĵorantoj havis interesajn kontaktojn, kaj povis argumenti pri la lingvo. Sed la rezulto de tia informado estas malfacile mezurebla.



Ni disdonis kalendaretojn, prospektojn "La Langue Equitable", rekomendis al la homoj eklerni la lingvon per la reto, antaŭ ol partopreni parolan kurson.

Espereble ĝi vekis iom da scivolemo kaj eĉ intereso.



Invito al **PRINTEMPaS**, intensivaj kursoj kun Radojica Petrović kaj Christophe Chazarein kaj internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1). De 26a de aprilo ĝis 4a de majo 2014 en la franca Esperanto-kastelo Grésillon. Retejo: <http://gresillon.org/printempo>  
Kontakto: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), +33-2.41.89.10.34, Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ, France.

Invitation à **PRINTEMPaS**, cours intensifs avec Radojica Petrović et Christophe Chazarein et examen international d'espéranto CECR (B1, B2, C1). Du 26 avril au 4 mai 2014 au château espérantiste de Grésillon. Site: <http://gresillon.org/printemps>  
Contact: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org), 02.41.89.10.34, Maison Culturelle de l'Espéranto, Grésillon, St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ.

## Bernard Bernard informas pri siaj spertoj kaj legadoj :

**Al kurso pri skribado kaj parolado en Esperanto** kun instruisto en Interreto mi aliĝis en oktobro 2013. La kursojn gvidas Maria Majerczak, universitata instruistino (Jagelona Universitato en Krakovo, Pollando). Mi jam partoprenis sep lecionojn. Mi estas kontenta pri tiu sperto, kaj mi multe lernas. La lecionoj estas praktikaj kaj altnivelaj. La partoprenantoj laboras sur siaj propraj tekstoj kaj paroloj. La instruistino estas ege kompetenta en diversaj fakoj pri lingvistiko kaj instruado de lingvoj. Tamen ŝi atente adaptiĝas al la nivelo de ĉiu partoprenanto kaj eltiras el ĉiu skriba kaj/aŭ parola esprimo elementojn por instrui la lernantojn. La kurso povus ŝajni kiel puzlo. Ĉe la fino de la sesmonata kurso (du horoj kaj dek kvin minutoj ĉiuvendrede) mi certas, ke la bildo estos pli bona posedo de Esperanto. La kurso estas ankaŭ interesa por mi ĉar mi lernas pli bone uzi la komputilon por pli bona komunikado.

**Nova SABATA kurso pri SKRIBADO kaj PAROLADO en Esperanto** estas proponita. Internacia, en Interreto, kun instruistino : Maria Majerczak, de 15 novembro 2013 ĝis aprilo 2014. Rapide rigardu :

<https://docs.google.com/document/d/11tZd-r470uOjg115lwmkf9rkCwD-Ys5Tu7s8WctPTwQ/preview>

Informu vin eĉ se nun iom malfruas. Profitu se restas loko por vi. Povus esti interesa por vi aliĝi. Aŭ esti preta por venonta kurso. Senhezite kontaktu Maria Majerczak : (esperanto.instruado.jag.univ.pl@gmail.com).

**La vojo de la libroj**, sur kiu mi

promenis dum kelkaj tagoj pensigis min pri la poeziaĵo "Feliĉa sorto" :

Feliĉa sorto, kiel Uliseses multvojaĝa, /  
Aŭ kiel konkerinto de la ŝaflano ora, /  
Reveni fine hejmen, kaj dum vivresto glora /  
Inter parencoj vivi pli sperta, kaj pli saĝa.

*Heureux qui, comme Ulysse, a fait un beau voyage, / Ou comme celui-là qui conquit la toison, / Et puis est retourné, plein d'usage et raison, / Vivre entre ses parents le reste de son âge !*

Anstataŭ la traduko de K. Kalocsay de tiu poemo de Joachim du Bellay, mi preferas tiun, kiun mi tute malakademie faras : *Feliĉa kiel Uliso, kiu faris belan vojaĝon ... kaj poste revenis hejmen plena de sperto kaj racio*. Tiel estas miaj sentoj post legado de kvar libroj : bela vojaĝo kaj nun reveni ĉe ni, en nia Esperanto-Komunumo.

Tiujn kvar librojn mi legis, unu post la alia en kelkaj tagoj. Ili vere plaĉis al mi, bone tiklis miajn pensojn kaj ankoraŭ okupas ilin. Mi legis tiujn librojn en la franca. Ili ŝajnas ne troveblaj en Esperanto. Mi rapide prezentas ilin :

- **Nekonata al tiu adreso**, *Inconnu à cette adresse*, de Kressman Taylor, tradukita el la usonangla *Address Unknown*. Temas pri novelo. Mi ege ŝatis. Eta juvelo. Ne legu la komentojn antaŭ ol legi la libron. La libreto estas mallonga. En dek naŭ leteroj oni malkovras kiel homoj povas fali en la kaptilojn de la eventoj, de la komplezo, de la krueleco kaj de la venĝemo. Ne temas prijuĝi. Kiel ni mem estus farintaj, ĉu ni estus submetitaj al tiaj epokoj kaj eventoj ?



- **Sola en Berlino**, *Seul dans Berlin*, tradukita el la germana verko de Hans Fallada (origina titolo : *Jeder stirbt für sich allein* / Ĉiu mortas sola). Terura romano laŭ aŭtenta kazo de germana rezisto kontraŭ naziismo. Mi vere ŝatis tiun libron. Ne legu la komentojn de Vikipedio, preferu unue legi la libron. Mi dum du tagoj ne povis lasi tiun libron flanke. En ĝi estas materialo por pripensi pri la homa naturo. Estas libro pri sinteno de rezisto kaj pri la konsekvencoj de la skribado. Tie temas pri diskretaj herooj, sed la prezo de tiu heroeco estis alta.

[http://eo.wikipedia.org/wiki/%C4%88iu\\_mortas\\_sole](http://eo.wikipedia.org/wiki/%C4%88iu_mortas_sole)

[http://fr.wikipedia.org/wiki/Seul\\_dans\\_Berlin](http://fr.wikipedia.org/wiki/Seul_dans_Berlin)

[http://de.wikipedia.org/wiki/Jeder\\_stirbt\\_f%C3%BCr\\_sich\\_allein\\_%28Roman%29](http://de.wikipedia.org/wiki/Jeder_stirbt_f%C3%BCr_sich_allein_%28Roman%29)

[http://en.wikipedia.org/wiki/Every\\_Man\\_Dies\\_Alone](http://en.wikipedia.org/wiki/Every_Man_Dies_Alone)

<http://www.amazon.fr/Seul-dans-Berlin-Hans-Fallada/dp/2070312968>

- **La perforto de la riĉuloj**, *La violence des riches*, de Michel Pinçon et Monique Pinçon-Charlot. Tiu libro estas bona helpilo por provi kompreni la nunan ekonomion.

- **Kaj Nietzsche ploris**, *Et Nietzsche a pleuré*, de Irvin Yalom, tradukita el la angla *When Nietzsche Wept*. Post legado de tiu libro mi pensas pli bone koni kaj kompreni min. Iamaniere ĝi helpis min resanigi kelkajn el miaj psikaj vundoj aŭ malfacilaj sentoj. Samtempe mi pensas pli bone koni kaj kompreni la homojn kaj miajn konatojn, kaj ankaŭ resanigi min de ili aŭ doni al mi ideojn, kiujn mi

povus proponi al ili kiel helpilo. Tiu libro estas kaj bona helpilo por mi individue kaj por miaj rilatoj kun la aliaj, aŭ vidoj kaj sentoj pri ili. Mi travivis tiun legadon kiel mempsikoterapio aŭ mempsikanalizo. Tiu libro respondas al miaj atendoj pri filozofioj : iloj por bone vivi, bone pensi, konsoli la aliajn kaj sin mem.

<http://www.galaade.com/oeuvre/et-nietzsche-a-pleure>

<http://www.amazon.fr/Et-Nietzsche-pleur%C3%A9-Irvin-Yalom/dp/2351760395>

[http://www.allocine.fr/film/fichefilm\\_gen\\_cfilm=197661.html](http://www.allocine.fr/film/fichefilm_gen_cfilm=197661.html)

[http://en.wikipedia.org/wiki/When\\_Nietzsche\\_Wept](http://en.wikipedia.org/wiki/When_Nietzsche_Wept)

[http://de.wikipedia.org/wiki/Und\\_Nietzsche\\_weinte\\_%28Film%29](http://de.wikipedia.org/wiki/Und_Nietzsche_weinte_%28Film%29)


**"La funkcio de la verkisto estas fari, ke neniu ignoru la mondon kaj ke neniu povu diri sin senkulpa."** (Sartre). Por tiuj kvar libroj la verkistoj vere bone laboris. Tiuj verkoj estas kaj estos vere utilaj por mi kaj miaj pripensoj.

**Mi serĉas en filozofio, sed ankaŭ en literaturo**, nutraĵojn kaj/aŭ ilojn, kiuj helpas min pli bone vidi, aŭskulti, pensi, kompreni, konsili, konsoli, kompati, pli klare paroli, pli utile skribi, pli bone elekti la bonan vojon kaj esti atenta al la bezonoj de la aliaj. Filozofio estas ankaŭ por mi ilo por pli certe scii kiel mi devas konduti, kaj laŭ eble vortigi ĝustajn konstatojn, kritikojn kaj proponojn por la homa socio eĉ politike.

**Miaj filozofiaj demandoj** (Kiel bone vivi ? Kiel esti feliĉa ? Kiel konduti ?) trovas kelkajn respondojn en tiuj libroj.

## Zamenhof-tago en Mulhouse la 14an de decembro 2013. Raportas Manfred

Laŭvice la ĉi-jara **Zamenhof-Festo** estis **organizita de la alzacanoj en Miluzo**; kaj por respekti la deziron de multaj partoprenantoj alveni per trajno, la festo komenciĝis jam je la 10-a matene. Tiel ankaŭ ni el la regiono de Frajburgo povis veturi per trajno kaj uzis la tiel-nomatan „Bluan Balenon“, kiu post plur-jara peto kaj diskuto ĉi-jare ligas Frajburgon kun Miluzo kaj ebligas dumtagan restadon ĝis la vespero.



832617	10h11	Thann Saint Jacques
TER 87482	10h11	Müllheim
TER 830449	10h39	Belfort
TER 831363	10h40	Colmar
832619	10h41	Thann Saint Jacques
TER 96252	10h44	Bâle
TOU LYRIA 9210	10h53	Zurich et Bâle

Ni kaj aliaj estis akceptataj en la stacidomo kaj de tie **promenis al la urbocentro**. Survoje ni jam ricevis informojn de Jacques pri la evoluo de la urbo dum la jarcentoj, kaj pri la historia signifo de la diversaj placoj. Kaj ni havis la eblecon viziti la Kristnaskan bazon; bedaŭrinde tiam ankoraŭ estis pluveta kaj malvarmeta vetero. Vizito al ekspozicio pri la teksaĵo-industrio en la Malnova Urbodomo kaj de la gotika templo - por ties bele koloritaj fenestroj bedaŭrinde mankis la suno - revarmigis nin iomete. De tie ni daŭrigis la promenon al la „Maison du temps libre“, renkontiĝejo ĉefe por emeritoj, kie ni ricevis tre bongustan menuon eĉ kun diversaj vinoj. Ĉar Andreo subtenas ilin pere de komputila kurso, ni havis la eblecon poste uzi la klerigejon por nia kunveno. Entute ni estis 30 samideanoj; en la aĝo inter 35 kaj 92 - la nelacigebla Dorina Renschler.



**Jacques Pineda rakontis pri la historio de Miluzo**, kies komenco legendece komenciĝis je muelejo, kiu donis la nomon, laŭ la alemana lingvo. Jam dum la tempo de la Sankta Romia Regno ĝi estis grava loko, kie plurfoje loĝis la imperiestro Ruĝbarbulo (1222). Kaj en la 15a jc. ĝi iĝis Imperia Urbo, kiu signifas, ke ĝi estis libera urbo kaj ne subulo de iu grafo aŭ episkopo; kaj akceptis la luteranan, protestantan kredon. Ĝi apartenis al la dek liberaj alzacaj urboj kaj en 1515 aliĝis al





la svisaj kantonoj; la svisaj/francaj nom-ŝildoj de kelkaj placoj kaj stratoj memorigas al tiu epoko. La alemana dialekto restis dum la jarcentoj kaj multaj alzacanoj estas minimume dulingvaj.

En la urbo evoluis la industrio de specialaj teksaĵoj (brodejoj, luksaj

fadenoj) kaj de la maŝino-konstruado. 1798 la civitanoj voĉdonis por aliĝi al Francio, ĉar la ĉirkaŭaj limoj malhelpis la evoluon. Dum tiu epoko la industrio konstruis lokomotivojn kaj poste dizel-motorojn, nuntempe la internacie plej konata estas Peugeot. Inter 1871 kaj 1919 Alzaco apartenis al Germanio. Pluraj grandaj muzeoj montras la industriajn evoluojn de Miluzo.



**Edmond Ludwig voĉlegis al ni poemojn de Gérard LESER** en la alzaca/alemana dialekto kaj kun siaj tradukoj. Malgraŭ tio, ke mi estas germano, mi tamen komprenis la poemojn pli bone en la Esperanto-versio, kaj pli poste kiam mi legis ĝin en la afable disdonita broŝuro.



**Poste venis kelkaj agado-informoj: Bruno Flochon informis pri la UK 2015 en Lille**, kaj jam nun UFE komencas organizi tiun grandan eventon, kaj li invitis al kunlaboro.

La juna brazilano **Diego transdonis salutojn de la organizantoj de la IJK** (Internacia Junulara Kongreso), kiu okazos komence de Julio en Fortaleza; kaj informis pri la eblecoj viziti post la IJK tiun vastan landon eble survoje al la Universala Kongreso en Bonaero fine de Julio.



**Manfred prezentis la aktualan raporton de la projektaro Mazingira en Tanzanio**, kaj dankas pro la donacitaj 90 eŭroj (subtenata de valoraj donacitaj de Dorina), kiu ebligas al tri orfoj viziti la lernejon dum unu jaro.

Post tio ni iris en la komputilan salonon por vidi **unuhoran kaj tre viglan filmon pri Esperanto** filmitan por SAT, kiu montras la historion, kaj nuntempan multifacetan vivon enkadre de Esperanto kun multaj originalaj eldiraĵoj de esperantistoj el la tuta mondo. La filmo estis tradukita kun subtitoloj en multajn lingvojn, kaj tiel taŭgas por esti montrata en multaj landoj. Kompreneble ĝi ne povas montri ĉion dum unu horo, ekzemple ĝi preterlasis la vivon ene de la diversaj fakaj grupoj.

Post la filmo paralele estis **anoncoj** de E.D.E., AVE (verduloj) kaj TAKE (jarlibro kaj plurlingva libro pri la Katedralo de Strasburgo, i.a. en Esperanto). Ni proponis Amerikan Tagon dum la venonta somero por pli detale ekkoni la urbon Miluzo.

Kaj ni ĝuis la kafumadon, kun tre riĉa kaj bongusta kuko-bufedo, dank'al pluraj samideaninoj; inter ili Simone Kiry, kiu bedaŭrinde ne povis ĉeesti pro hospitaliĝo pro leŭkemio, kaj ni ĉiuj esperas por ŝi bonan resaniĝon.

## Büawasprìng

Manfred Westermeyer

## Knabaj petolaĵoj



Jen kelkaj ret-ligoj por trovi pli detalajn informojn:

Mulhouse, E.D.E. : [www.wikipedia.org](http://www.wikipedia.org)  
Mazingira, AVE :  
[www.verduloj.org/afriko.htm](http://www.verduloj.org/afriko.htm)  
UK,IJK: [www.UEA.org](http://www.UEA.org)  
Filmo pri Esperanto de SAT:  
[www.satesperanto.org/](http://www.satesperanto.org/)

Dulingva (elzasa/Esperanto) poemaro de la elzasa poeto Gérard LESER .  
Traduko de Edmond LUDWIG

Mendebla por 1 eŭro ĉe la tradukisto  
ESPERANTO  
26, route de la Schlucht  
68140 STOSSWIHR


# 75a Regiona Staĝo de Esperanto

organizita  
de

MULHOUSE  ESPERANTO

Por

En amikaj rilatoj kun  
**BAVELO**



4 / 5 / 6-ajn de aprilo 2014

En la Feriejo Le Torrent 4, rue de Mollau  
68470 STORCKENSOHN

## Prelegoj de Hannes Larsson



Hannes Larsson naskiĝis en Nokia, Finnlando en 1931. Li diplomiĝis ĉe la Teknika Universitato de Helsinko. Sian karieron kiel inĝeniero li faris en Finnlando, Francio, Italio kaj Belgio. Hannes specialiĝis pri la rezisto de strukturoj kaj materialoj kaj laboris inter alie en du kampoj de pinta teknologio : la spaco (strukturoj kaj kontrolo de temperaturo de satelitoj) kaj la problemoj de nukleaj reaktoroj. Liaj ŝatokupoj estas la muziko, la matematiko, la skikurado (li partoprenas plurajn popularajn longdistancajn skikuradkonkursojn en pluraj landoj kaj skikuradas pli ol 1500 km ĉiujare), kaj de kelkaj jaroj Esperanto.

Hannes jam organizis seminarion pri distraj matematikoj en la UK de Bjalistoko kaj prelegis en la UK de Rejkjaviko kadre de la Kongresa Universitato.

Hannes jam organizis seminarion pri distraj matematikoj en la UK de Bjalistoko kaj prelegis en la UK de Rejkjaviko kadre de la Kongresa Universitato.


## Distra vespero



Jen nova juna talento.

Mélanie estas 17 jara knabino kun propra forta karaktero.

Ŝi kantas por ni en pluraj lingvoj, kaj en Esperanto okaze de ŝia koncertosabate vespere.



### Atingeblecoj:

Plej proksima stacidomo de la staĝejo troviĝas je 3 km en **Wesserling**.

Inter **Mulhouse** kaj **Wesserling** veturas pluraj regulaj trajnoj kaj aŭtobusoj en la tago.

Ni povos sendi al vi la diversajn horarojn inter tiuj du stacidomoj kaj laŭ peto ni veturigos vin de la stacidomo de Wesserling al la staĝejo.

Ĉi-tiu ferio-komplekso situas meze de altaj Vogezoj, ĉe rando de arbaroj en mirinda sep-hektara parko. Ĝi troviĝas survoje inter Thann kaj Bussang.

La konstruaĵoj estas renovigitaj. Apartaj du-ŝejo kaj necesejo por 2 ĉambroj.

ALIĜOJ	antaŭ la 1a de februaro 2014	ekde la 1a de februaro 2014
Ĉef-aliĝanto abonanto al "La Informilo" aŭ loĝanta ekster Francio	20 €	25 €
Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilon"	35 €	40 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	15 €	20 €
Aliĝo por infanoj kaj gestudentoj	2 €	4 €
Restado-kostoj		
Duon-pensio: (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 1 manĝo)	40 €	
Kompleta pensio (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 2 manĝoj)	47 €	
Suplemento por individua ĉambro	9 €	
Apartaj manĝoj	16,50 €	
<b>Aktualigitaj informoj kaj aliĝilo aperos en nia retejo: <a href="http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr">http://esperanto.alsacelorraine.perso.neuf.fr</a></b>		

# Aliĝilo por la 75a Regiona Staĝo de Esperanto en Storckensohn la 4/5/6ajn de aprilo 2014

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ- kotizo	Elektita kurso
1	ĉef-aliĝanto				
2	kun-aliĝantoj				
3					
4					

Adreso




Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon **La Informilo** dum unu jaro.

La aliĝ-kotizo entenas la partoprenon al elektita kurso aŭ prelego kaj al la distra vespero.

Mi preferas, ke mia adreso ne aperu en la dokumentoj disdonataj dum la staĝo (signu)

Mi preferas vegetaran manĝon (signu)

Telefono:

Ret-adreso:

Mi pagas (minimume la aliĝkotizon) jenan sumon: .....  
 per ĉeko  per ĝiro  al Yves STUTZ  
 per internacia ĝiro  al nia peranto en Germanio   
 Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (krucumu)

Nombro da manĝoj kaj da tranoktadoj	Vendrede	Sabate	Dimanĉe
Tagmanĝo			
Vespermanĝo			
Tranoktado : nombro da personoj			
Ĉambro: indiku vian preferon	1-lita (kun suplemento) 2-lita                                      3-lita		

## **Provizora Programo:**

### **Vendrede 4-an de aprilo 2014**

- 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj
- 17a30 eblas libere viziti
- 19a30 Vespermanĝo
- 21a45 Malfermo de la knajpo.

### **Sabate 5-an de aprilo 2014**

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Vizito al milita tombejo Vieil Armand aŭ Hartmannswillerkopf
- 12a Reveno al la staĝejo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de la alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo
- 14a30/18a Kursoj A, B, C, kaj D.
- 19a30 Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero kun Mélanie
- Knajpo

### **Dimanĉe 6-an de aprilo 2014**

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj A, B, C, kaj D
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30 Komitat-kunsideto
- 14a Turismado
- Poste: disiĝo

### **KURSOJ**

#### **A: Komencantoj (débutants)**

Cours pour débutants par Ginette Martin. Elle apportera le matériel adéquat.

#### **B: Kurso por progresantoj**

Gvidas Roberto Kueny

#### **C: Progresantoj:**

Paroliga kurso tute en esperanto.  
Gvidas Edmond Ludwig

**Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :**

Yves Stutz,  
45A, Avenue Charles de Gaulle  
68700 Cernay

**Ĉekoj je la nomo de: Yves Stutz**

**Internaciaj ĝiroj al: Yves Stutz**

**IBAN:**

FR7610278035100001386770771

**BIC: CMCIFR2A**

**Por Germanio al nia peranto:**

je la nomo de: Hans-Dieter Platz.

(menciu la celon de via pago)

Poŝtĝirokonto:

918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA

Ludwigshafen

**Pliaj informoj ĉe:**

[ystutz@voila.fr](mailto:ystutz@voila.fr)

Tel. 06.38.63.20.79

**D: Seminario:**

Prelegas Hannes Larsson

**Sabate posttagmeze:**

La violono. Tio inkluzivas ĉion: historio, violonfarado, ludtekniko, komponaĵoj kaj violonistoj.

**Dimanĉe matene:**

Spertoj de novaj esperantistoj  
La etoso de la prelego estas humura. Esperanto estas ja universala lingvo, sed necesas alkitimiĝi al la akĉentoj de la hispanoj, britoj, rusoj, japanoj kaj (por eksterlandanoj) la francoj.

**La libroservo proponos siajn 680 titolojn dum la tuta staĝo**



# Nia Kalendaro 2014

<b>Januaro 2014</b>	<b>10</b>	Ni kune festos la 3 reĝojn en Espace 110 anstataŭ nia kutima kurso de la 18a30 ĝis la 20a
	<b>17 - 21</b>	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30
	<b>27</b>	Verda fadeno proponita de Bertrand de la 19a ĝis la 20a30 en restoracio de la Poste, 10 rue de Huningue en Saint-Louis.
	<b>31</b>	Membro-kunveno en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
<b>Februaro 2014</b>	<b>7 - 14 - 21</b>	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30
	<b>24</b>	Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse
<b>marto 2014</b>	<b>14- 21 - 28</b>	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30
	<b>31</b>	Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 20a30 en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis
<b>aprilo 2014</b>	<b>4 - 5 - 6</b>	Nia regiona staĝo okazos en Storckensohn laŭ programo en ĉi-tiu numero
	<b>11</b>	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30
	<b>28</b>	verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse
<b>majo 2014</b>	<b>9 - 16 - 23</b>	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30
	<b>26</b>	Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 20a30 en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



Nek izoliteco, nek malproksimeco,  
Malebligas la bonvolemon,  
Kion oni decidas vivi kaj esprimi,  
Tion oni decidas vidi kaj akcepti.

Ke la bonvolemo  
Estu la lumo por viaj paŝoj  
Kaj la fortoj por viaj pensoj.  
Bonan kaj feliĉan jaron 2014.

Bernard Behra